




LILLE 2015
espéranto
Ni subtenas!

# Kandidatodosiero por Lillo (Lille) kiel universala kongresurbo en 2015

Espéranto-France
Unuiĝo Franca por Esperanto


1. Enkonduko ........ 2
2. Lillo: viva urbo kerne de Eŭropa Unio ........ 3
3. La kongresejo: Lille Grand Palais ........ 6
4. Loĝado: loĝeja diverseco ĉirkaŭ la kongresejo ........ 8
5. Ekskursoj: inter historio kaj tipeco ........ 9
6. Aliaj programeroj ........ 10
7. Diversaĵoj ........ 11
8. Unuaj partneroj ........ 12

# Enkonduko

**Universala Kongreso estas ĉiujara ĉefmomento** en Esperantujo: tie renkontiĝas plej multaj esperantistoj el la tuta mondo por ĝui la plezuron konversacii internacilingve, por koniĝi unuj kun aliaj, por plikleriĝi, por debati kaj decidi pri politikoj de la Esperanto-movado, por ekkoni urbon kaj regionon kaj por distriĝi.

**Universala Kongreso donas eksterordinaran impulson** al la Esperanto-movadoj urba, regiona, landa. Dum nia asocia movado ofte suferas pro manko de volontuloj por responsi, agadi aŭ helpi, Universala Kongreso povas doni al homoj kaj asocioj celon kaj plian entuziasmon kaj instigi ilin al pli facila kontribuemo al la movado.

**Francio rolis kaj plu rolas grave** en la tutmonda Esperanto-movado. En 1997 nian landan asocion honorigis la Fyne-trofeo pro ĝia agado rilate informadon kaj komunikadon. Francio estas fama kaj aktiva landa movado: fama pro ĝia esperantista historio, kiu portas i.a. la unuan Universalan Kongreson de Esperanto en 1905 en Bulonjo-ĉe-Maro (norda Francio); aktiva pro la ĉiujaraj aranĝoj, agadoj kaj kunlaboroj de la Unuiĝo Franca por Esperanto, la regionaj federacioj kaj la fakaj asocioj.

En 2005 la Nordfrancia Esperanto-Federacio kun la Unuiĝo Franca por Esperanto, SAT-Amikaro k.a. sukcese organizis la internacian amikecan renkontiĝon Boulogne 2005 en Bulonjo-ĉe-Maro por festi la centan datrevenon de la unua Universala Kongreso.

En 2015 okazos la 100a Universala Kongreso. Profitante tiun simbolan numeron, estus tre oportune kaj simbole akcepti ĝin en Francio, pli precize en la regiono de la unua Universala Kongreso.


**Tial la Unuiĝo Franca por Esperanto kandidatas por akcepti en 2015 la 100an Universalan Kongreson de Esperanto en la nordfrancia ĉefurbo Lillo (Lille) kun tuttaga ekskurso en Bulonjo-ĉe-Maro!**

Ni certas pri la alta intereso organizi kun UEA tiun Universalan Kongreson en Francio kaj en Lillo. Se UEA decidos favore al ni, certe ni tiam kapablos arigi ĉies fortojn por organizo de sukcesoplena, antaŭeniga kaj memorinda Universala Kongreso en 2015.

*LA LANDA KOMITATO*
*DE LA UNUIĜO FRANCA POR ESPERANTO*

# Lillo: viva urbo kerne de Eŭropa Unio

## Lillo cifere




| | |
|---|---|
| **Loĝantaro :** | 220 000 loĝantoj en Lillo (4ª urbo el Francio). |
| | 1 200 000 loĝantoj en la Lilla metropolo (4ª kunurbaĵo el Francio). |
| | 2 000 000 loĝantoj en la eŭrometropolo Lille-Kortrijk-Tournai (1ª el Eŭropo). |
| | 36 % da loĝantoj estas sub 25-jaraj. |
| **Ekonomio :** | 100 000 studentoj kaj 3 000 esploristoj (3ª universitata areo el Francio). |
| | 2ª urbo el Francio por akcepto de internaciaj sidejoj. |
| **Turismo :** | Super 400 000 vizitantoj ĉiujare en la Turisma Oficejo. |
| | Ĉirkaŭ 60 % da vizitantoj venas el eksterlando, el 60–70 landoj. |
| | La muzeo Palais des Beaux-Arts estas unu el la plej riĉaj el Francio. |
| | 115 sankciitaj hoteloj kun 7 000 dormoĉambroj. |
| **Transporto :** | Lillo estas tre facile alirebla kaj trairebla. |
| Avie : | La Lilla flughaveno estas la plej proksima al la urbocentro (10 km) kompare kun aliaj urboj (navedoj kun 18 tien-reenaj veturoj ĉiutage). |
| Aŭte : | Lillo troviĝas kruce de 8 aŭtovojoj (el Parizo, Bruselo, Amsterdamo, ktp.). |
| Trajne : | La stacidomo Lille-Flandres estas la 1ª provinca stacidomo (po 61 000 trajnantoj tage). La stacidomo Lille-Europe (TGV) ebligas tre regulajn veturojn al/de grandaj metropoloj francaj kaj eŭropaj (po 15 000 trajnantoj tage). |
| En urbo : | 1ª aŭtomata metroo el la mondo (60 stacioj laŭ 45 km).<br>Moderna tramo, 41 buslinioj, 4 translandlimaj linioj. |
| **Kulturo :** | 280 monumentoj kaj klasifikitaj lokoj.<br>20 muzeoj, i.a. Palais des Beaux-Arts (2ª muzeo el Francio, post Louvre). |
| **Famuloj :** | Sébastien le Prestre de Vauban, Louis Pasteur, Charles de Gaulle, k.a. |

## Lillo geografie

Lillo estas la ĉefurbo de la departemento Nord kaj de la regiono Nord-Pas-de-Calais, unu el la plej loĝataj regionoj el Eŭropo, kaj situas meze de la “eŭroregiono” Kent - Norda Francio - Belgio. Tre facile alirebla, ĝi troviĝas je malpli ol 1 horo for de Parizo, 35 minutoj for de Bruselo kaj 80 minutoj for de Londono!

## Lillo kulture kaj turisme



Rigardante al la estonteco, Lillo tamen fiere konservas siajn historion, tradiciojn kaj identecon. La strategia situo de Lillo klarigas, ke la urbon konkeris laŭvice la flandroj, la britoj, la nederlandanoj, la hispanoj kaj la francoj. Tiuj epokoj plu videblas per miriga arkitekturo kun diversaj influoj.



Tiel en Lillo kunestas malnovo kaj novo. Du simboloj estas la Malnova Borso konstruita en 1652 (ĉi-supra foto) kaj la modernaj turoj de la negoca kvartalo Euralille fondita en 1994 (ĉi-maldekstra foto). La riĉeco de la diversepokaj stiloj donas evidentan ĉarmon al la urbo.

Lillo estas urbo plej agrabla. Laŭ siaj stratoj la vizitantoj trovas luksajn butikojn kaj butikoplenajn piedstratojn, gastronomiajn restoraciojn kaj tipajn tavernojn, artogaleriojn kaj multkolorajn stratbazarojn…

Kulturo grave rolas en Lillo, kiu enkalkulas i.a. 20 muzeojn kaj plurajn kulturdomojn “Maisons folie”. Inter la muzeoj elstaras Palais des Beaux-Arts pro la kvalito de siaj kolektoj. En 2012 malfermiĝis la muzeo Louvre-Lens 40 km for de Lillo.



Sincero, gastigemo, festemo kaj bonetoso plene apartenas al la Lilla vivo. Dumjare okazas multaj festivaloj, paradoj, spektakloj, gravaj ekspozicioj… Rimarkinda estas la granda stratbazaro de Lillo, kiu estas la 2ª plej ampleksa stratevento el Eŭropo.

En 2011 *Guide Vert Michelin* aljuĝis tri stelojn al Lillo, kio konfirmas la altan turisman kvaliton de la urbo.

## Lillo eŭrope




*www.lille3000.eu*

Lillo estis la **eŭropa ĉefurbo pri kulturo** dum la jaro 2004 kaj akceptis 9 milionojn da vizitantoj. De tiam ĝi plifamiĝis eŭropskale per multaj kulturaj eventoj popularaj. Lillo iĝis viva urbo kultura kaj turisma. De post tiam Lillo regule organizas kulturajn jarojn nomitajn “Lille 3000”, ĉiun duan aŭ trian jaron (la venonta okazos en 2012, poste eble en 2015).




La unuan fojon en Eŭropo, en 2008, estis kreita eŭropa grupo por teritoria kunlaboro (EGTK): **Eŭrometropolo Lille-Kortrijk-Tournai**. Ĝi arigas 147 urbojn francajn kaj belgajn (inkl. flandrajn kaj valonajn), t.e. unu grupo el du landoj, tri komunumoj. Ĝi estas la plej vasta EGTK el Eŭropo. Ĝi celas vivteni dialogon kaj kunlaboron, kaj krei transliman koherecon.

*www.eurometropolis.eu*

## Lillo ekonomie

Dank’ al sia geografia situo, la Lilla metropolo allogas sidejojn de **gravaj multnaciaj firmaoj**. Lillo akiris scipovon pro sia industria historio. Ĝi estas la eŭropa ĉefurbo pri teksaĵfarado kaj koresponda vendado.




Lillo estas la **3ª plej granda universitata areo** el Francio pro siaj 100 000 ĉiujaraj studentoj, siaj 3 000 esploristoj en 250 laboratorioj, siaj negocistaj kaj inĝenieraj altlernejoj kaj la plej granda medicina fakultato el Eŭropo.

Kvin kompetentogrupoj (*pôles de compétitivité*) kunlaborigas la entreprenistojn kaj la esploristojn en la Lilla metropolo super pluraj kampoj: inteligenta transporto (iTrans, mondskala kompetentogrupo), teknika teksaĵo (UpTex), negoco (PiCom), hejmaj materioj (MAUD) kaj nutrado/sano/vivdaŭro (NSL).

# La kongresejo: Lille Grand Palais

La kongresejo Lille Grand Palais troviĝas en la negoca kvartalo Euralille kaj nur kelkajn minutojn piede for de la urbocentraj stacidomoj. Fasonita de arkitekto Rem Koolhass, ĝi estas 45 000 m² vasta.


*www.lillegrandpalais.com*




Lille Grand Palais enkalkulas:
- 18 000 m² da ekspoziciejo;
- 3 aŭditoriojn kun 300, 500 kaj 1 500 sidlokoj;
- 27 kunvenoĉambrojn;
- 1 koncertejon Zénith Arena kun 5 000 sidlokoj;
- 1 182 aŭtopark-lokojn.

Ĉiujare Lille Grand Palais gastigas pli ol 300 aranĝojn diversampleksajn kaj pli ol 1 milionon da vizitantoj. Ĝi krome estas la unua kongresejo atestita "HQE" (alta media kvalito).

Skemo pri la organizo de Lille Grand Palais:



## La akceptejo



Tiu teretaĝa akceptejo estas la ĉefa enirejo de Lille Grand Palais. Sur tiu ebeno 1 500 m$^2$ vasta eblas instali vestejon, informejon, registrejon kaj ĉian necesan indikaron.

La tuta kongresejo havas sendratan retkonekton (WiFi).

## La koncertejo Zénith Arena

La koncertejo enkalkulas de 2 500 ĝis 5 000 sidlokojn. Ĝi tre taŭgas por ampleksaj eventoj tre diversaj: rokmuzikaj koncertoj, konferencoj, enmerkatigoj, ktp.





## La aŭditorioj

Aŭditorio Vauban



1 486 sidlokoj kun trinivelaj pordoj al aliaj kongresejaj partoj

Aŭditorio Pasteur



486 sidlokoj en la kerno de la kongresejo

Aŭditorio Eurotop



314 sidlokoj kun tabloj kaj individuaj sonsistemoj

## La kunvenoĉambroj

Estas multaj kunvenoĉambroj, po 85 ĝis 196 m$^2$ vastaj, en 4 niveloj de la kongresejo.









# Loĝado: loĝeja diverseco ĉirkaŭ la kongresejo

Lillo kaj ĝia metropolo disponas pri loĝeja oferto vasta kaj diverstipa:

| | | |
|---|---|---|
| Kategorio | 5-stela | 212 ĉambroj |
| | 4-stela | 1 266 ĉambroj |
| | 3-stela | 2 357 ĉambroj |
| | 2-stela | 1 875 ĉambroj |
| | 1-stela | 425 ĉambroj |
| | senstela | 934 ĉambroj |
| Apartementhoteloj | | 268 ĉambroj |
| Sume | | **7 337 ĉambroj** |




Pluraj el tiuj hoteloj (ĉ. 3 000 ĉambroj) kaj junulara amasloĝejo troviĝas en la urbocentro, proksime al la kongresejo Lille Grand Palais (facila pieda alireblo, densa metro- kaj bus-reto):



# Ekskursoj: inter historio kaj tipeco

## Bulonjo-ĉe-Maro



Nepre necesa ekskurso kompreneble estos la merkreda, **tuttaga ekskurso en Bulonjo-ĉe-Maro**. Ĝi povos konsisti el matenaj solenaĵoj kun la lokaj aŭtoritatoj (simile al tiuj okazintaj en la internacia amikeca renkontiĝo Boulogne2005) kaj matenaj kaj posttagmezaj vizitoj de la urbo kaj de la nacia mara muzeo Nausicaá.



La solenaĵoj povos okazi en la urbodomo; en la urba teatrejo, kie estis inaŭgurita la unua Universala Kongreso; sur la stacidoma placo Zamenhof, kie staras busto de Zamenhof.

## Tra la Lilla regiono

La Turisma kaj Kongresa Oficejo kaj la Regiona Turisma Komitato proponos diversajn gvidatajn ekskursojn (*social programmes*) en Lillo, en la Lilla metropolo kaj en la regiono, kiuj daŭros horon, duontagon aŭ tagon. Ekzemple:



**Lillo kaj la Lilla metropolo**
Ekskurso historia kaj arkitektura tra la urbocentro kaj la malnova kvartalo de Lillo, sed ankaŭ en la metropolo kun ekz. la arta kaj industria muzeo de Roubaix (ĉi-dekstra foto).



**Mineja heredaĵo**
Vizito de la Mineja Historia Centro en Lewarde, kiu prezentas la tricentjaran historion de la nordfrancia mineksplutado. La Centro estas la plej ampleksa mineja muzeo el Francio.

**Marborda riĉeco**
Pluraj ekskursoj ĉe la nordfrancia marbordo: en la urboj Kalezo (Calais) kaj Le Touquet, ĉe la du kaboj, en tipe lokaj bierfarejoj…

**Muzeo Louvre-Lens**
Vizito de la en 2012 inaŭgurita muzeo Louvre-Lens, dua establaĵo de la fama pariza muzeo.

## Ekster la Lilla regiono



Pluraj ekskursoj (en la kongreso aŭ kiel antaŭ- aŭ post-kongresoj) povos okazi en la "eŭroregiono", ekz. en la flandra Bruĝo aŭ en la angla Kent… sed ankaŭ en la franca ĉefurbo Parizo, en la eŭropunia Bruselo aŭ en la trans-Manika Londono.

# Aliaj programeroj

## Nacia vespero



En la komenco de la Universala Kongreso okazos la nacia vespero por prezenti al la tutmondaj kongresanoj muzikajn kaj dancajn spektaklojn el tuta Francio.

Dum la vespero la kongresanojn akceptos “**gigantoj**”, kiuj estas elstaraj simboloj de la nordfrancia kulturo. La nacia vespero konsistos el:

1º **koncerto de la koruso Interkant** (gvidata de Franjo Lévêque), kiu kantos la operon *Carmen* laŭ tekstoj esperantigitaj de Franjo Lévêque;

2º **koncerto de Jacques Yvart**, nordfrancia kantisto: li kantos la esperantigitajn kanzonojn de la fama franca kantisto Georges Brassens;

3º **kelta dancado de bretona dancistaro**;

4º **koncerto de muzikistoj el la Lilla Nacia Orkestro**.






La urbodomo financos la nacian vesperon i.a. per senpaga disponigo de spektaklejo kerne de la urbo Lillo.

## Akcepto de kongresanoj far la urbodomo



En la kongresa ĵaŭdo la Lilla urbestraro honorigos la Universalan Kongreson invitante almenaŭ 200 kongresanojn al honorvino en la urbodomo kun oficialuloj.

# Diversaĵoj

## Kongresaj datoj

La Universala Kongreso ĝenerale okazas en la dua duono de julio aŭ en la komenco de aŭgusto. La kongresejo Lille Grand Palais estas nun libera dum julio kaj aŭgusto. La Universala Kongreso tiel povus disvolviĝi ekzemple de ĵaŭdo la 23a de julio ĝis sabato la 1a de aŭgusto 2015 (inkl. de la muntaj tagoj).

## Komunikado kaj reklamado

Por komuniki pri la Universala Kongreso ekzistos la retejo *www.lille2015.fr* en pluraj lingvoj (almenaŭ Esperanto, la franca, la angla kaj la nederlanda) kaj la Facebook-paĝo de Lille2015 (*www.facebook.com/lille2015*).

Por reklami pri la Universala Kongreso la Nordfrancia Kongresa Oficejo (vd. p. 12) propramone presos reklamfoliojn kaj mem deĵoros kun la LKK dum la 99a Universala Kongreso en Bonaero.

## Trilanda kunlaboro

La situo de Lillo en la centro de la triangulo Londono-Bruselo-Parizo oportunigus kunlaboron inter la francoj, la britoj kaj la belgoj pri programeroj, precipe ekskursoj, antaŭkongresoj aŭ postkongresoj. Tia trilanda kunlaboro jam fariĝis kadre de la internacia amikeca renkontiĝo Boulogne2005.

## Kulturo kaj spektakloj

Se "Lille 3000" (vd. p. 5) falos en 2015, estos oportune kunlabori kun la Lilla metropola aŭtoritato kaj la zorganto de "Lille 3000" por enŝovi kulturajn, spektaklajn programerojn de la Universala Kongreso en la oficialan programon de "Lille 3000" – kio des pli diskonigos la Kongreson kaj Esperanton al la loĝantaro.

## Internacia Junulara Kongreso

Foje aŭdiĝis/fariĝis ideo inter UEA kaj TEJO iel pliproksimigi iliajn respektivajn kongresojn. La 100a Universala Kongreso povus esti okazo por organizi samurbajn kongresojn, ekz. unue la Universalan Kongreson fine de julio en Lille Grand Palais (Lillo), sekve la Internacian Junularan Kongreson komence de aŭgusto en la Universitata Vilaĝo (*campus universitaire*) de la Lilla Universitato (Villeneuve-d'Ascq, najbara urbo de Lillo, kun metroo al la Lilla urbocentro). Se tia hipotezo interesus JEFO'n kaj TEJO'n, povus fariĝi kolektiva aŭ konsiliĝa laboro inter la Universala Kongreso kaj la Internacia Junulara Kongreso.

# Unuaj partneroj

## Oficialaj aŭtoritatoj

**Atout France**
Subtenas la ŝtata agentejo por la turisma evoluigo de Francio kaj ties ĝenerala directoro Christian Mantei.

**Regiono Nord-Pas-de-Calais**
Subtenas la regiono Nord-Pas-de-Calais kaj ties prezidanto Daniel Percheron.

**Urbo Lille**
Subtenas la urbo Lillo kaj ties urbestrino Martine Aubry.

## Turismaj kaj kongresaj servoj

**Nordfrancia Kongresa Oficejo (Nord France Convention Bureau)**
Ĝi senpage kontribuas al la kandidateco helpante por konsistigi la finan kandidatecan dosieron prezentotan al UEA. Ĝi kunordigas lokajn instancojn tra la tuta norda Francio.
*www.nord-france-convention.com*

**Lille Grand Palais**
Ĝi estas la plej grava kongresejo el Lillo, kun koncertejo, aŭditorioj, kunveno-ĉambroj, ekspoziciejoj kaj aŭtoparko. Ĝi troviĝas tre proksime al la urbocentraj stacidomoj.
*www.lillegrandpalais.com*

**Turisma kaj Kongresa Oficejo de Lillo**
Ĝi senpage kontribuos al la organizo per loka kunordigo de lokaj instancoj (hotelaro, kulturejoj, ktp.), zorgo pri la loĝejaj rezervoj, propono de turisma programo, disponigo de kongresanaj dokumentoj, ktp.
*www.lilletourism.com*

## Subtena letero de Atout France

ATOUT FRANCE | France

Le Directeur général

Professeur Probal Dasgupta
Président de l'Association mondiale d'Espéranto

Paris, le 20 juin 2013

Monsieur le Président et les membres du Comité Exécutif d'Universala Espéranto Asocio,

C'est avec plaisir que je souhaite vous exprimer mon soutien à la candidature de Lille pour accueillir le 100° Congrès mondial de l'ESPERANTO du 25 juillet au 1er août 2015. La venue d'une manifestation telle que le Congrès mondial de l'ESPERANTO représente pour notre destination un véritable enjeu économique. En vertu de mes fonctions de Directeur Général d'Atout France, je soutiens pleinement le projet.

Atout France, nouvelle agence du tourisme français, est un modèle unique et original de partenariat public et privé, qui tient compte d'une mise en œuvre réussie de politiques publiques. Aujourd'hui, opérateur unique de l'Etat en matière de tourisme, Atout France a des plans ambitieux pour une politique publique mieux coordonnée et plus efficace, afin de répondre aux défis posés par le tourisme français.

En vue de célébrer la centième édition de ce congrès, j'espère sincèrement que la France et la ville de Lille auront le privilège et l'honneur d'accueillir votre Congrès Mondial en juillet 2015.

Très sincèrement,

Christian MANTEI

79-81, rue de Clichy - 75009 Paris - France
Tél : 33 (0)1 42 96 70 00 - Fax : 33 (0)1 42 96 70 11 - www.franceguide.com
GIE ATOUT FRANCE - RC Paris 87 C 0033 - SIRET 340 709 211 00072 - APE 7990 Z - FR 39340709211

Subtena letero de la Regiono Nord-Pas-de-Calais

RÉGION
Nord-Pas de Calais

CONSEIL RÉGIONAL

Daniel PERCHERON

PRÉSIDENT
SÉNATEUR DU PAS-DE-CALAIS

Au Professeur Probal Dasgupta, Président

Lille, 24 mai 2012

Réf. : Candidature pour l'accueil du 100° Congrès mondial d'Espéranto – 2015

Monsieur le Président et les membres du Comité Exécutif d'Universala Espéranto Asocio,

C'est avec plaisir que je voudrais vous exprimer mon soutien à la candidature de Lille pour accueillir le 100° Congrès Mondial de l'Espéranto en juillet 2015. En vertu de mes fonctions de Président du Conseil Régional du Nord-Pas de Calais, je crois aux qualités de ma région et j'ai pleinement confiance dans l'accueil qui sera réservé aux membres de votre association en Région Nord-Pas de Calais.

Notre région, située au cœur de l'Europe, carrefour d'échanges, revendique l'ambition d'attirer et de retenir les femmes et les hommes d'ailleurs, les idées et les entreprises d'un territoire qui appartient au socle de la force Européenne.

L'Homme est au centre des préoccupations régionales et sa formation au rang de nos priorités. La Région Nord-Pas de Calais est la région la plus jeune de France où 36% de la population à moins de 25 ans et plus d'un million de ses habitants a moins de 20 ans. De cette jeunesse, nous tirons l'énergie et un sens inné de la célébration comme le prouvent les nombreux rassemblements (Carnaval de Dunkerque ou Braderie de Lille) qui ponctuent notre vie citoyenne.

La région Nord-Pas de Calais est fortement engagée dans le développement culturel de son territoire et dans sa démocratisation. Avec un orchestre national de renom, sept scènes nationales, trois centres dramatiques nationaux, des conservatoires, des écoles d'art, un réseau muséal de grande qualité (40 musées dont le futur Louvre à Lens) un grand centre de culture scientifique et technique, la Région a l'ambition d'amener la culture au cœur de chacun de ses habitants.

La très active fédération Espéranto-Nord a été fondée en 1908 peu après le premier congrès mondial d'Espéranto qui s'est tenu en 1905 dans notre région, à Boulogne-sur-Mer. En vue de célébrer la centième édition de ce congrès, le Président de la Fédération Espéranto Nord, Monsieur Michel Dechy, tous les membres d'Espéranto France et moi-même serions honorés d'accueillir à nouveau les espérantistes dans notre belle région.

Au plaisir de vous accueillir dans le Nord-Pas de Calais en 2015,

Très sincèrement.

Daniel PERCHERON

151 avenue du Président Hoover - Lille - Accès métro : Lille Grand Palais
Tél + 33(0)3 28 82 82 82 - Fax + 33(0)3 28 82 82 83

Correspondance administrative : Monsieur le Président du Conseil Régional Nord - Pas de Calais
Siège de Région - F 59555 LILLE CEDEX - www.nordpasdecalais.fr

Conformément aux articles 39 et suivants de la loi 78.17 du 6 janvier 1978, le droit d'accès et de rectification des informations vous concernant s'exerce auprès de la Présidence du Conseil Régional Nord - Pas de Calais

**Subtena letero de la urbo Lille**

R É P U B L I Q U E F R A N Ç A I S E

Ville de Lille

LE MAIRE

Lille, le – 5 JUIN 2012

Monsieur Michel DECHY
Président de « Lille – Villeneuve Espéranto »
65 allée de la crémaillère
59650 Villeneuve d'Ascq

Monsieur le Président,

Je voudrais exprimer mon soutien à la candidature de Lille pour accueillir le centième Congrès Mondial de l'Espéranto en juillet 2015.

En tant que Maire de la Ville de Lille et Présidente de Lille Métropole Communauté Urbaine, je crois aux qualités de ma ville et j'ai pleinement confiance dans l'accueil qui sera réservé aux membres de votre association tant à Lille que dans la Région Nord Pas de Calais.

Lille est une terre d'échanges, une métropole dynamique et cosmopolite au cœur de la région la plus jeune de France. De cette vitalité nous tirons l'énergie et un sens inné de la célébration festive comme le prouvent les nombreux rassemblements tel que le Carnaval de Dunkerque, ou la Braderie de Lille.

La Métropole Lilloise met un point d'honneur à réhabiliter son patrimoine industriel en de nouveaux lieux culturels innovants ou des expositions d'artistes internationaux s'invitent et où la culture se vit tous les jours et à tous âges.

Avec un Palais des Congrès situé au cœur de la ville, à quelques minutes à pied des deux gares TGV, une capacité hôtelière de plus de 7000 chambres, une proximité avec de grandes capitales européennes (Londres 80 minutes, Paris 60 minutes, l'aéroport Roissy Charles de Gaulle 50 minutes et Bruxelles 25 minutes) notre position stratégique facilitera la venue et les déplacements de vos participants en provenance du monde entier.

La très active Fédération Espéranto-Nord a été fondée en 1908 peu après le premier congrès mondial de l'Esperanto qui s'était tenu en 1905 à Boulogne-sur-Mer.

En vue de célébrer la centième édition de ce congrès, je serais honorée d'accueillir à nouveau les espérantistes du monde entier dans notre région.

Je vous prie de croire, Monsieur le Président, à l'assurance de mes sentiments les meilleurs.

Martine AUBRY